

Alvenis la tago. IJK 2022. Aliĝu.

Longe ni atendis. Eble tro longe. Sed ne plu eblas nei la fakton: IJK en Nederlando okazos, kaj vi nepre, absolute, tutcerte ne rajtas maltrafi ĝin. Nenio pli grava antaŭe aŭ poste okazos.

IJK 2022

DE ROERDOMP – WESTELBEERS, NEDERLANDO

20–27 AŬGUSTO 2022

**ALIĜU FRUE KAJ RICEVU
SENPAGAN T-ĈEMIZON!**



Eblos aliĝi ekde la 30-a de oktobro 2021

Validas nur por aliĝoj ĝis la 23:59 CET de la 9-a de novembro 2021

Igu <https://ijk2022.tejo.org/> jam vian komencaĝon, parkerigu ĝian enhavon kaj mense pretiĝu por **sabato la 30-a de oktobro je 21:30**, kiam finfine malfermiĝos la aliĝilo por IJK 2022!




Imagu jam viajn tagojn en kaj apud tiu lago

Ĝis tiam legu ĉion pri la nekredeble malaĉa kongresejo, informiĝu pri Nederlando kaj kiel vojaĝi al ĝi, konsideru kiun loĝstilon vi preferas, kaj instruadu Esperanton al ĉiuj konatoj, por ke ili ankaŭ ĉeestu kaj festu.

Kaj nepre ne malfru via aliĝo, ĉar nur en la unuaj dek tagoj vi ricevos **senpagan T-ĉemizon!**

Esperanto estas por vojaĝi, vojaĝu kun ni al la IJK!

<https://ijk2022.tejo.org>



Pos-Amiko

Aŭtuno 2021, numero 38

Pensu pri aliaj homoj, restu hejme kaj havigu la gazeton!

INDEKSO:

1. Eksperimento pri fizika renkontiĝo
2. Komitato diskutas alternativajn oficejojn
2. EC-kortumo stiras al konstitucia krizo
3. Kara Koko
3. NEJ-Novaĵoj
3. Horoskopo
4. EVENTOJ

KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

<http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko>

Eksperimento pri 'fizika' renkontiĝo duonsukcesa

Je la fino de oktobro okazis stranga eksperimento en izolita loko norde de civilizacio: Ry. Tien DEJO kaj kunlaborantoj decidis igi homojn vojaĝi por amase pasigi tempon en la sama konstruaĵo. Tiu ĉi stranga formo de renkontiĝo kontrastas kun la kutima Esperanto-renkontiĝo, en kiu homoj ensalutas de la komforto de sia hejmo kaj batalas kun mikrofonoj kaj retkonektoj anstataŭ la strangaj ĝenaĵoj spertitaj en Ry.

Partoprenantoj de la eksperimento ŝatis la kvaliton de la konekto, la pli interaktivajn programerojn kaj la fakton, ke ili ne mem bezonas kuiru, tamen ankaŭ estis diversaj plendoj. Unu ĝena afero estis, ke kapoj de homoj troviĝas je malsamaj altecoj, necesigante multajn movojn de la kolo simple por paroli kun aliaj. Ĉeestantoj ankaŭ ne komprenis la bezonon por korpaj odoroj kaj ronkado, ambaŭ nur ĝenis kaj nenion aldonis al la etoso. Konfuzo kreiĝis pro la fizikaj nomŝildoj, kiujn malkiel digitalaj nomŝildoj oni facile forgesas en ĉiaj lokoj. Ankaŭ la papera Pos-Amiko kreis konfuzon, ĉar ne eblas simple sendi kopion al amiko.

Amuza momento okazis, kiam unu partoprenanto kiel kutime demandis al alia "Kion vi manĝas?". La ideo, ke ĉiuj samtempe

manĝas la saman aferon, bezonis iom da tempo por akceptiĝi kaj kompreniĝi. Homlupa ludo tute fuŝiĝis pro manko de privata babilfunkcio: homlupoj parolis laŭte unu al la alia dum la nokto, ne konsciante ke aliaj simple ĉion povas aŭdi. Granda sukceso ŝajnis esti la unuigita horzono, ĉiam fonto de ĝeneto en internacia komunikado, sed la organizantoj sabotiĝis sin mem ŝanĝante la horzonon meze de la eksperimento.

Komitato diskutas alternativajn UEA-oficejojn

Post la ŝoka raporto pri vendo de la Centra Oficejo kaj translokigo de multaj servoj al Slovakujo en la komitato de UEA estiĝis vasta diskuto pri la temo. Ne ĉiuj konsideras vendon evitebla, kaj eĉ inter tiuj, kiuj poras vendon, malkonsento regas pri la plej taŭga laborloko por diversaj fakoj:

- Unu komitatano proponas ludoni la tutan oficejon krom la kafoĉambro, kaj tie plu labori, ĉar ĝi ĉiam estis la plej produktiva laborejo
- Alia ideo estas igi la hejmoficejon de Martin Schäffer ankaŭ UEA-oficejon.
- E@I proponis movi ankaŭ ĉiujn ceterajn taskojn al ilia oficejo, inkluzive de komitataj lingvaj diskutoj
- La TEJO-estraro preferas novan oficejon sur baleara insulo, ĉar tien plej facilus allogi volontulojn
- Fine la oficistoj de UEA mem preferus vendi la Volontulan Domon kaj teni la oficejon, ĉar ilia opinie oni plej bone dormas en la oficejo

EC-kortumo stiras al konstitucia krizo

En ŝoka deklaro pasintlunde la plej alta kortumo de la EC (Esperanta Civito) deklaris, ke kiam leĝoj de la memdeklarita subjekto de internacia juro kaj la Eŭropa Unio, politika komunumo de 27 membroŝtatoj, kolizias, la civita konstitucio superu la unian leĝaron. Tio kontraŭas la juran bazon de la Eŭropa Unio, ke ĝiaj reguloj aplikiĝas ĉie kaj ĉiam same, kaj pro tio certe gvidus al politika konflikta, punrimedoj kaj eble eĉ forpelo, se iu ajn en la eŭropaj instancoj iel ajn zorgus pri la ekzisto de la Civito.

Kara koko...

“Kiel vi povas verki artikolon pri renkontiĝo okazanta post presado de Pos-Amiko?”

Kara homo,

El via perspektivo tio certe ŝajnos kiel miraklo, sed por kokoj estas alie. Ni observas homojn kaj facile antaŭvidas iliajn agojn, kaj kio estas tute logika por ni, tio por homoj ofte aperas kiel surprizo! Ja memoru, ke la koko aperis unue.

Mi do simple kolektas informojn el miaj fontoj kaj verkas pri la neevitebla reagoj kaj konsekvencoj, por liveri al vi plej valorajn novaĵojn.

Poso

Skribu viajn demandojn al

kkps.klackunveno@gmail.com

NEJ-Novajoj!

Membrokunveno de NEJ

NEJ okazigos sian jaran membrokunvenon je dimanĉo la 31-a de oktobro 9:30-11:30 en Ry, Danujo, okaze de KKPS. Reta partopreno kaj voĉdonado por membroj eblos per <https://us02web.zoom.us/j/86356045495>.

Aktivuloj serĉataj

Ĉu vi volas helpi pri la realigo de la IJK 2022? Ĉu vi volas iĝi parto de la KKPS-teamo? Aŭ ĉu vi simple volas klaĉumi kun NEJ-estraranoj? Tuj informiĝu ĉe plej proksima persono en orangkolora ĉemizo.

LA HOROSKOPO

Ŝafo: Amikoj ne lasas amikojn maltrafi la unuan IJK-aliĝperiodon.

Taŭro: Oni ne gajnas en renkontiĝo kolektante plej multajn nomŝildojn.

Ĝemeloj: Ne indas fizike kunporti falsan fonbildon ĉien.

Kankro: Vi estas en trejnado kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Leono: Oktobro estas bona monato por pretiĝi por novembro.

Virgulino: Post iro al ĉielo kaj reen vi ne plu estos.

Pesilo: Ne kulpigu vian retkonekton, se vi ne klare aŭdas ĉeestanton.

Skorpio: Evitu postrenkontiĝan sindromon, iĝu KKPS-organizanto.

Valentin: Ili baldaŭ trovos vin. Fuĝu.

Sagitario: La plej bona metodo por nei klaĉojn estas mem krei aliajn.

Kaprikorno: Memoru: ĉio kio bongustas, eĉ pli bongustos fritita.

Akvisto: Iu ĉarma akademiano donos komplementon al vi.

Fiŝoj: Plibeligu vian dorson, finfine homoj povos vidi ĝin.